

---

**34****(3 / 2001)****Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)****LEA/G****MAGAZINO****Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj  
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete  
inkluzivas la organon  
de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE) La Socialisto**

---

## **Liberal - Frei**

Frei ist eine Partei, eine Vereinigung, die vorurteilslos für die Rechte des Einzelnen eintritt. Frei ist der Mensch, wenn er selbstverantwortlich unter Berücksichtigung der Rechte des Mitmenschen handelt. Im Prinzip bietet die Demokratie diese Freiheiten und Rechte.

Mitunter verbrämen Bewegungen ihre wahren Aktivitäten mit der Bezeichnung *frei*, *freiheitlich*, in ihrem Namen. Ähnlich kann eine christliche Vereinigung nur dann wirklich als christlich angesehen werden, wenn deren Mitglieder und Vorstand christlich handeln.

Unsere Vereinigung, der Freie Esperanto-Bund in deutschsprachigen Gebieten, führt den Hinweis *Freier...* aus folgenden Gründen:

Vor dem ersten und dem letzten Weltkrieg, vor dem Beginn der Nazi-Diktatur in Deutschland betonten Verbände der Arbeiterbewegung ihre Freiheit von der Vorherrschaft des Kapitals und der adeligen Gesellschaft schon dadurch, daß sie *frei* ihrem Verbandsnamen hinzusetzten. Es gab zum Beispiel – sie existieren im Grunde immer noch – die *Freien Schwimmer*, die *Freien Turner*

## **Libera**

*Libera* estas partio resp. unuiĝo, kiu senantaŭjuĝe pledas por la rajtoj de la unuopulo. *Libera* estas homo, kiu memrespondece, ĉe memkomprenebla konsidero pri la rajtoj de la kunvivanto, agas. Principe, la demokratio proponas tiujn liberecojn kaj rajtojn.

Ekzistas movadoj, kiuj sian asocian nomon kaj siajn verajn aktivecojn malkarakterizas per la etiketo *libera* k.a. Simile, kristana unuiĝo estas vere kristana nur, se ĝiaj membroj kaj estraro kristane agas.

Nia unuiĝo, la *Libera Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj (LEA/G)*, montras la atributon *libera* pro la sekvantaj motivoj:

Antaŭ la unua kaj la lasta monda milito, antaŭ la komenco de la nazia diktaturo en Germanio unuiĝoj de la laborista movado akcentis siajn liberecojn rilate al la hegemonio de la kapitalo kaj rilate al la aristokrataro jam per la indiko *libera* en la unuiĝa nomo. Ekzemple ekzistis (kaj ankoraŭ ekzistas) la *Liberaj Naĝantoj*, la *Liberaj Sportantoj* k.a. Antaŭ jaroj okazis en Duisburg (germana Rejnlando) ekspozicio de tiaj or-

## Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:  
 Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj (LEA/G) / Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEA/G)  
 Renschener Str. 47, DE-77704 Oberkirch,  
 (Tel. +Fax: (07802) 90 336)  
 LEA/G en TTT: <http://home.nexgo.de/gmickle/leag/index.html>  
 Redakcio / Redaktion:  
 Gary Mickle (GM), Brüsseler Str. 6,  
 DE-13353 Berlin, (Tel.: (030) 453 96 47),  
 refadreso / E-mail-Adresse:  
[gmickle@nexgo.de](mailto:gmickle@nexgo.de)  
 Hans Rodewig (HR), Stammestr. 86D,  
 DE-30459 Hannover  
 Albert Stephan (AFS), ĉe la supre indikita  
 adreso de LEA/G / unter der oben ange-  
 gebenen LEA/G-Adresse  
 Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la  
 redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi  
 alsendaĵojn.  
 Redaktofino: varias (kontakto GM sub la  
 supre indikita adreso)  
 MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint  
 vier Mal jährlich;  
 abonprezo / Bezugspreis 15,- DM  
 La membrotizo entenas liveradon de la  
 bulteno.  
 LEA/G-konto: Jiri Proskovec  
 n-ro 9168 434 Postbank Essen  
 (BLZ 360 100 43)  
 Represo de materialo permesita, se la fonto  
 estas indikita.

u.a. Man sang proletarische Freiheits-  
 lieder. vom *Freiheitsmorgen*, auch *Hoch  
 das Freie Wort* (*Arbeiterlied, Sozialisten-  
 marsch*).\*

*Frei* besagte auch, daß eine freie Ver-  
 einigung unabhängig zu handeln ge-  
 dachte und handelte.

Die Arbeiter-Esperanto-Bewegung  
 wurde 1933 durch die Nazi-Diktatur  
 zerschlagen. Schon bald nach Ende des  
 Krieges, im Jahre 1945, trafen sich die  
 Arbeiter-Esperantisten; sie waren zu-

## NEKROLOGO

La 21-an de julio ĉj., en la aĝo  
 de 81 jaroj, mortis en Düssel-  
 dorf nia tre fidela kaj aktiva  
 membro

Hans Meyer.

Tio estas tre bedaŭrinda perdo  
 por nia asocio. – Ni kondolen-  
 cas al lia edzino Anni kaj la  
 famillianoj.

## Ŝanĝitaj TTT-adreso kaj retpoŝta adreso

Bv. noti la novan TTT-adreson de la  
 LEA/G-paĝaro: <http://home.nexgo.de/gmickle/leag/index.html>. La malnova  
 adreso jam ne validas!

Kunredaktoro Gary Mickle sciigas  
 ankaŭ sian novan retpoŝtan adreson:  
[gmickle@nexgo.de](mailto:gmickle@nexgo.de). La malnovaj ankoraŭ  
 plu funkcias.

## Naskiĝtago de Albert Stephan

Gratulon al la prezidanto de LEA/G  
 kaj kunredaktoro de la *Magazino*  
 Albert Stephan okaze de lia baldaŭ  
 (la 6an de oktobro ĉi-jare) festota  
 80a naskiĝtago!

ganizaĵoj; ankaŭ nia *libera* asocio pre-  
 zentis sin per stando. Siatempe la ge-  
 kamaradoj kantis proletajn kantojn, ekz.  
 kanton pri la *Libera Mateno*, kaj, *Vivu la  
 libera Vorto* (*laborista kanto, socialista  
 marŝo*).\*

*Libera* signifis ankaŭ, ke libera unu-  
 iĝo intencis agi sendepende kaj agas  
 tiamaniere.

La laborista Esperantomovado estis  
 disbatita de la nazia diktaturo en la jaro  
 1933. Jam tuj post la fino de la milito,  
 en 1945, la laboristaj esperantistoj kun-

nächst in den bürgerlichen Gruppen  
 aktiv, und gründeten schließlich 1956  
 den *Freien Esperanto-Bund für deutsch-  
 sprachige Gebiete* gedacht als Fortsetz-  
 ung der Arbeiter-Esperanto-Vereini-  
 gungen vor 1933.

\*Quelle: Fritz-Hüser-Institut, Dortmund  
 Die österreichischen Freunde verei-  
 nigten sich in der *Österreichischen Sozi-  
 alistischen Liga der Esperantisten (ASLE)*.

In diesem Zusammenhang ist der  
 Sozialdemokrat und spätere österrei-  
 chische Bundespräsident *Franz Jonas* als  
 Motor der Arbeiter-Esperantobewegung  
 in Österreich nicht zu vergessen.

Kurzum: Das Wort *Freier* im Namen  
 des deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes  
 besagt nicht, daß er etwa eine Unter-  
 organisation der *Freien Demokratischen  
 Partei* ist. Die Bezeichnung bedeutet  
 lediglich, daß unser Bund sich frei und  
 vorurteilslos für *Esperanto* einsetzt und  
 es als neutrale, leicht erlernbare, welt-  
 weit gesprochene Sprache der Arbeiter-  
 schaft zur Verständigung mit den  
 Arbeiter-Esperantisten im Ausland emp-  
 fiehlt. So ist eine Abwägung der Lebens-  
 verhältnisse der Völker möglich.

venis kaj komence estis aktivaj en la  
 burĝaj Esperanto-grupoj. Ili fondis en  
 Germanio la movadon *Libera Esperanto-  
 Asocio por germanlingvaj regionoj*  
 (LEA/G) kiel daŭrigon de la *Laboristaj  
 Esperantistoj* antaŭ 1933.

La aŭstriaĵ gekamaradoj unuiĝis en la  
*Aŭstria Socialista Ligo Esperantista*  
 (ASLE).

Ni ne forgesu mencii la socialdemo-  
 kraton kaj poste aŭstrian Prezidenton  
*Franz Jonas*, la motoron de la laborista  
 Esperanto-movado en Aŭstrio.

Mallonge: La vorto *Libera* en la nomo  
 de la germana laborista Esperanto-unu-  
 iĝo ne signifas, ke ĝi estas suborganizo  
 de la *Liberala Demokratia Partio*, sed  
 nur, ke nia asocio libere kaj sen antaŭ-  
 juĝo aktivas por la lingvo *Esperanto*.  
 LEA/G – en komuna laboro kun la  
 laborista monda organizo – *Sennacieca  
 Asocio Tutmonda*, sidejo Parizo, reko-  
 mendas al la laboristaro la facilan lern-  
 adon de tiu mondwide uzata lingvo por  
 ekscii pli pri la vivkondiĉoj de la labor-  
 istaro en la mondo.

Albert Stephan

# Anakronismaj LEA-oj kun aktuala ekzistkialo

de Gary Mickle

En la ĵusa speciala numero de *Esper-  
 anto aktuell* ('Den Arbeitern aller Länder  
 eine Sprache', p. 17) Thomas Bormann  
 diagnozas la staton de nia Asocio:

«Post la milito formiĝis ĉie en Ger-  
 manio novaj laboristaj Esperanto-  
 grupoj. En la soveta zono de okupa-  
 cio oni en la senco de la stalinisma

politiko malpermesis ilin en 1949;  
 nur en 1965 oni permesis kaj ak-  
 celis Esperanton en GDR. En FRG  
 la laboristaj esperantistoj estis org-  
 anizitaj unue en la Germana Esper-  
 anto-Asocio. Kiam tiu en 1955 en  
 Neustadt/Weinstraße aliĝis al UEA,  
 multaj tamen pro tio vidis la

neŭtralecon atencita kaj fondis en Frankfurto ĉe Majno la *Liberan Esperanto-Asocion*. Ĝi vidas sin en la tradicio de la laboristaj esperantistoj, sed hodiaŭ apenaŭ plu havas signifon. La granda epoko de la laboristaj esperantistoj estis la dudekaj jaroj.» [La traduko de la germanlingva originalo estas mia: GM]

Kiu protestus kontraŭ ĉi tiu prezento? El la perspektivo de 2001 ĝi estas ĝusta pritakso. Eblas diri pri LEA/G – kaj ĉi tio validas ankaŭ por aliaj LEA-oj – ke ĝi estas duoble arkaikiĝinta:

#### La laborista kulturmovado forvaperiĝis

Ĝia etoso kaj ĝia deklarita celgrupo ne plu impresas kiel io de nia epoko. Sig-nife ampleksa aŭtonoma laborista kulturmovado ne plu ekzistas. En Germanio ĝi estis vitala en la 20aj kaj 30aj jaroj de la pasinta jarcento. La laborista medio tenis sin fiere memstara kaj klasbataleca. Laboristaj kulturaj, sportaj kaj klerigaj asocioj, ofte ligitaj kun la du grandaj klasaj partioj socialdemokrata kaj komunista, multnombre agadis. La tiama GLEA (antaŭanto de LEA/G) estis parto de tiu proletara kulturmovado.

Post la dua mondmilito la laborista kulturmovado en la plej bona kazo flagris rando de la socia medio de socialdemokratoj kaj sindikatoj. Hodiaŭ ĝi ne plu estas socie signifa fenomeno.

Ne utilas lamenti pri tio, ke la kapitalismo eniris novan fazon, ke la tutmonda laborista klaso strukturiĝas alie ol komence de la jarcento, ke gravaj partoj de ĝi en Eŭropo kondukas kaj sintenas multe pli kiel laborista aristokratio ol kiel revoluciaj klasbatalantoj. La tiama kondiĉoj – granda kaj relative homogenea industriproletaro kun unu-

ecaj vivkondiĉoj – favoris la klasbatalemon kaj la klasan sendependemon, sub kiuj la laborista Esperanto-movado povis grandiĝi. Tiaj kondiĉoj nun forestas.

Kaj tamen la klasbatalo plu ekzistas. De kelkaj jaroj ĝi ŝajnas fortiĝi. Ni observas tion okaze de la akriĝantaj protestoj kontraŭ la novliberala tutmondigo, kontraŭ rasismo kaj ekskludo. Ĝiaj formoj estas kompreneble aliaj ol en eksaj epokoj.

#### Organizformoj de antaŭ jardekoj

La organiza strukturo de tradiciaj Esperanto-organizaĵoj estas ne laŭtempa. Ne povas esti tre konsole, ke ĉi tiu problemo trafas ĉiujn asociojn egale. Pri GEA Roland Schnell skribis antaŭ kelkaj semajnoj:

«De jaroj mi provis klarigi al esperantistoj, ke la mondo ŝanĝiĝis. Komunitilaj asocioj estas relikvoj de pratempo. Ili ne plu estas avantaĝaj kiel eble en la jaro 1970.

La strukturo de la tradiciaj asocioj estas tro komplika, absorbas tro da laborkapablo por vivteno de la aparato, ke indas el vidpunkto de organizkonsultanto starigi la demandon, ĉu ili estas vere efikaj. Sed ĉi tiun demandon oni instinkte rifuzas.

La problemo ne estas nuligo de la tradiciaj asocioj, sed la efektivigo. Se la efektivigo ne okazas, la nuligo estas la natura sekvo. [...]

Aliaj organizaj strukturoj povas ekflori en la kadro de tradicia strukturo, se ĝi estas preta. En tiu kazo la malnova strukturo travivas kiel papilio. Se ĝi ne estas preta, la novaj strukturoj ekestas ekster kaj en akra opizicio.»

Unu baza problemo estas tiu ĉi: kiu uzas interreton, ne tre bezonas Esperanto-asociojn por esti informita pri

Esperanto-eventoj. Unu kialo malpli por kotizi al asocio. Plia: kiu lernis kaj uzas Esperanton en nefinvenkismaj rondoj, ne bezonas «batalantan» movadon, agadojn ĉe parlamentanoj, kontaktojn kun ministerioj, ktp.

La skleroza stato, kiu videbliĝas en asocioj de la UEA-medio, jam de pli longa tempo karakterizas partojn de la SAT-medio. En LEA/G pluraj homoj streĉas sin por teni la faleman asocian fasadon staranta, dum la energio disipata por asociaj formalajoj mankas por vera politika laboro.

#### La pozitiva flanko de la medaliono

Ĉio supre dirita ne estas aŭdaca analizo, kaj verŝajne ne ŝokas iun ajn. Mi kredas povi aserti, ke la medaliono havas alian flankon: la flankon, kiu rilatas al la estonteco.

Ankaŭ la postmilita tempo kun socie integrita laboristaro, kreskanta prospero ktp. estis historia fazo, ne pli. Tri eblaj faktoroj de nova polusiĝo en la Esperanto-movado dum la venontaj jaroj estas jenaj:

- La demando, ĉu «fina venko» estas legitime esperebla sub kondiĉoj de la ekzistanta socia ordo (al kies regantoj la nuna lingva ordo bonege konvenas), estas demando, kiun neniu faros, se ne la maldekstruloj. Ĝi postulas respondon, ĉar la agadoj ĉe parlamentanoj, Uno kaj Unesko estas rimedorabaj. Jen potenciala fonto de estontaj konfliktoj.
- La ekonomia distavoliĝo inter riĉuloj kaj malriĉuloj ene de la monda socio kaj ene de unuopaj landoj alkondukas situacion, en kiu Esperantujo distavoliĝos laŭ «klasoj», kio povas grave influ iilian rilaton al la movadaj ofertoj.

- Plej grave, la politika linio de la Esperanto-movado antaŭvideble iĝos malpli senpene interkonsentebla, ol ni spertis dum la pasintaj jardekoj. Konturiĝas malagrabla etnicisma politika linio en parto de la UEA-medio. La aperigo de la lingvonaciisma broŝuro *Brilu ĉiu lingvo samrajte* de L. Gados, germanlingve ĉe GEA, itale ĉe FEI, ŝajne jam ankaŭ en aliaj lingvoj kaj lokoj, kiel ankaŭ la agado laŭ simila linio de aktivuloj en pluraj landoj en asocioj por protekto de naciaj lingvoj kaj kulturoj, signalas la disvastiĝon de diferencismaj ideologioj en la ĝenerala movado. La «neŭtrala» movado estas serioze makulita de ideoj tipe asociitaj kun la «nova dekstrularo». Feliĉe, la kontraŭuloj do ĉi tiu linio komencis pli ofte fari sin rimarkataj. Kelkaj el ili nun kunlaboras kadre de la Sennaciisma Frakcio de SAT. Tiu evoluo respegulas tutsocian, almenaŭ en okcidenteŭropaj landoj, tendencon: ŝoviĝon de parto de la ĝenerala publika opinio en kontraŭnaciisma direkto. Laŭ mi tre esperiga afero.

Malamikan alfrontiĝon inter du politike difinitaj, apartaj movadoj, kiel okazis en la 20aj kaj 30aj jaroj inter UEA kaj SAT, mi ne volus vidi. Sed mi pledas por politike kaj organize memstaraj organizaj strukturoj de Esperante parolantaj maldekstruloj.

#### Maldekstra alternativo pli ol iam bezonata

La LEA-oj ne povas konkurenci kun la landaj asocioj de UEA. Eĉ postanĉeli ili ne povas. Sed nun, en 2001, eblas devanci la UEA-medion sur unu specifa, grava kampo – per alpreno de konsekvence rezistema sinteno al la naciismo kaj la ideologioj, kiuj apogas ĝin.

Anoj de SAT kaj la LEA-oj povas, sed ne devas, konsideri sin sennaciistoj. Sed nepre ili strebu esti sennaciuloj, homoj, kiuj penas pensi ekster naciaj kategorioj. Kaj sennaciuloj ne povas esti indiferentaj pri la naciismo, ankaŭ ne pri tiu ĝia subtila varianto, kiu furoras en kelkaj medioj de la «neŭtrala» movado. Organize kaj idee memstara medio, alternativa al la «neŭtrala» movado kaj ne ĝia «peresperanta» kompletigo, pli ol iam necesas. Ĝi estas i.a. la rezerva movada strukturo, potenciala kontraŭpezo al la «neŭtrala» movado kaj malfermita al novaj membroj, se en tiu «neŭtrala» movado la naciisma tendenco ekregos kaj difinos la etoson.

La estonta interrete bazita alternativa, maldekstra Esperanto-medio certe strukturiĝos tute alie ol laŭ la modelo de SAT + LEA-oj, kiun ni heredis de antaŭaj generacioj. Verŝajne ĝi kombinos trajtojn kaj de la nuna anonima kaj «anarkia» interreto, kaj de la klasikaj komunutilaj asocioj. Jam nun videbliĝas en la interreto, ankaŭ en ties komercaj ofertoj, la unuaj konturoj de «klubaj» servoj, ĉar kluboj evidente plu kontentigas homajn bezonojn.

Mi sentas min iom kulpa, ke mi pro tempomanko ne povis ĝis nun evoluigi la dissendoliston LEA-G (kaj ankaŭ la *Magazinon*) laŭ la koncepto prezentita

anonco

**KARTONO** estas sendependa, anarkiista skuato, kiu funkcias de majo 2001 j. En ĝi loĝas du personoj kaj hundo. Ni okupis ĝin fine de aprilo. Ni havas du ĉambrojn kaj grandan salomon sube. Krom tio, ke ni loĝas en la KARTONO, ni volas organizi diversajn liberecanajn projektojn, kiel art ekspoziciojn, anarkiistajn renkontiĝojn ktp. Ni kreis anarkiistan vivstrukturon, kiu funkcias apud la oficiala strukturo de la socio. Ni interesiĝas pri lokaj aferoj kaj ni subtenas la kunlaboron inter ĉiuj loĝantoj de nia urbo. Ni okupiĝas ankaŭ pri ekologio kaj alternativa kulturo. I.a. unu el ni propagandas Esperanton, kiel alternativan, revolucion solvon de la komunikproblemo en la mondo (kaj en la anarkiista medio). Ni esperas, ke KARTONO funkcios senprobleme (ĝis nun, ni ne havis problemojn kun porkpolicistoj, ĉu naziuloj – restu tiel!). Se vi estos en la suda parto de Pollando, ni invitas vin al KARTONO! LIBERAJ DOMOJ POR LIBERAJ HOMOJ! Lukaso Wróbel, P.O. BOX 146, PL-34-120 Andrychów 1, pendumito@poczta.fm

en *Magazino* 31 (p. 30-32). Iom kulpa, ĉar mi evidente mistaksis miajn personajn eblojn. Sed ne abisme kulpa. Pli da tempo mi malgraŭvole ne havis por disponigi al la afero.

Por vere komenci roli kiel dua «organo» de la Asocio, pli da gekamaradoj – membroj kaj nemembroj de LEA/G – devus sen kajolado aliĝi al ĝi. Nun homoj iĝas elektemaj, se temas pri interretaj dissendolisto. Tiaj kreskas kiel fungoj el la tero, kaj neniu havas tempon aŭ emon partopreni en ĉiuj. Mi povas diri, ke ĝis nun LEA-G venigas nur moderan nombron de mesaĝoj en la poŝtkestojn, kaj ne tro babilecajn. Neniu do estos priŝutita. La dissendolisto ankoraŭ ne havas sufiĉe da membroj por esti la enkorpiĝo de la maldekstra medio de la germanlingva mondparto, sed ĝi funkcias kaj jam enhavis kelkajn interesajn debatojn: aliĝu!

#### Aliĝu al la dissendolisto LEA-G !

Ĉiu, kiu havas aliron al la retpoŝto, povas aliĝi al [lea-g@yahogroups.com](mailto:lea-g@yahogroups.com) kaj aktive partopreni la debatojn aŭ nur kibici, laŭplaĉe. Aliĝu, sendante malplenan mesaĝon al [lea-g-subscribe@yahogroups.com](mailto:lea-g-subscribe@yahogroups.com), aŭ pli facile, per mesaĝo al la administranto Gary Mickle: [gmickle@nexgo.de](mailto:gmickle@nexgo.de).

paĝoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)

# La Socialisto

## Sieger und Sprachen Venkintoj kaj lingvoj

### Zweiter Teil

*Jetzt kommt (und ist schon seit 110 Jahren da!) Esperanto und die Europäische Union mit ihren erst nur 9 und jetzt 12 gleichberechtigten Sprachen!*

*Die horrenden Übersetzungskosten rufen nach Vereinfachung.*

*Und nun steht das Englisch-Amerikanische in einer einmaligen (ihr noch gar nicht bekannten) Situation: Zum ersten Mal im Laufe der Geschichte könnte eine Großmacht auf die uralte Gepflogenheit verzichten, ihre Sprache als Brückensprache zu erzwingen! Aus Gedankengängen heraus, die früheren Untertanenvölkern noch völlig unbekannt waren können wir jetzt in neuen Maßen der Billigkeit, der Vernunft heraus denken. „Menschenrechte“, „Menschenwürde“ „Gerechtigkeit für alle Sprachen“ (warum soll ein Volk keine Brückensprache lernen müssen), all diese Gedanken könnten und sollten zum ersten Mal in der Geschichte Gestalt annehmen, wenn die Sieger der beiden letzten Weltkriege sich dazu herbeilassen könnten, der einzigen neutralen, seit langem bewährten Sprache ihre Aufmerksamkeit und Anerkennung zu schenken.*

*Zum ersten Mal ein großzügiger Sieger! Ein Novum, eine Neuheit in der mehrtausendjährigen menschlichen Geschichte! Wäre das nicht den Versuch wert?*

*Wo ist der „Kaiser Konstantin“ der Esperantisten, der, jetzt ein ganz Groß-Einflussreicher der Amerikaner, Esperanto als Zei-*

### Dua parto

Kaj nun venas (jam ekzistas dum 110 jaroj!) Esperanto kaj la Eŭropa Unio kun ĝiaj unue nur 9 kaj nun 12 egalrajtaj lingvoj!

La egaj tradukkkostoj postulas plifaciligon.

Kaj nun staras la angla-usona lingvo antaŭ unika (al ĝi eĉ ankoraŭ ne konata) situacio. Je la unua fojo en la irado de la historio, superpotenco povus rezigni je la praa kutimo altrudi sian lingvon kiel pontan lingvon! Pensante en maniero tute nekonata al ĝisnunaj subulaj popoloj ni nun povus pensi en novaj skaloj de justeco, de prudento. „Homaj rajtoj“, „Homa digno“, „Justeco por ĉiuj lingvoj (kial unu popolo ne lernu pontan lingvon), ĉiuj ĉi pensoj povus reliefigi, se la venkintoj de la du lastaj mondmilitoj povus subiĝi, doni sian atenton kaj agnoskon al la unusola neŭtrala lingvo jam delonge provita.

Unuafoje malavara venkinto! Novaĵo en la plurmiljara homa historio! Ĉu tio ne estas provinda?

Kie estas la „Imperiestro Konstantino“ de la esperantistoj, kiu, nun iu ege influhava homo el la usonanoj, agnoskas Esperanton kiel signon, same kiel siatempe Konstantino agnoskis la kristanisman estonteca af-

chen erkennt wie seinerzeit Konstantin das Christentum als zukunftssträftig erkannt und zur Staatsreligion gemacht hat? Welcher oder welche Großen der Jetztzeit sehen die Zeichen der Zukunft für Esperanto? Zamenhof schrieb seherisch: „...vielleicht erst nach Jahrhunderten...“.

Ende

Verfasst von Gen. Herta Niessner,  
Obfrau der ASLE



#### Elektio de la LEA-estraro

Ni formale protestas pro la ne okaz-  
i(a)nta re- aŭ novelektio de la estraro.

Ni tre bone konas la problemon.  
Ankaŭ mi (Manfred) ja prezidis LEA/G  
dum vico da jaroj, kaj plurfoje ne  
povis okazigi elektojn pro la sama  
kaŭzo.

2001-05-27

Manfred k. Consuelo Führer

#### Libroservo

La ge-Führer ne plu zorgas pri la  
LEA/G-libroservo, sed nur pri abononj.  
Tamen estas ebla aĉeti librojn el  
restanta stoko. Eblas ricevi rabatojn:  
inter 10% kaj 50%. Interesuloj bv.  
mendi katalogon (kontraŭ poŝtmarkoj  
por 1,50 DM (-,77 €).

M. FÜHRER, Am Stadtpfad 11, DE-  
65760 Eschborn, tel.: 06196-46194;  
fakso: 06196-967728; retadreso  
manfred.fuehrer@esperanto.de .

ero kaj faris ĝin la ŝtata religio? Kiu aŭ kiuj  
granduloj de la nuntempo vidas la signojn  
de la estonto por Esperanto?

Zamenhof skribis vizie: „...eble nur post  
jarcentoj...“

Fino

Verkita de k-dino Herta Niessner,  
estrino de ASLE

#### Wichtige Mitteilung!

### Die Aŭstria Socialista Ligo Esperantista ASLE

(Österreichischer Bund sozialistischer  
Esperantisten)

hält am Mittwoch, dem 10. Oktober  
2001 eine

Ordentliche  
Generalversammlung ab.

Ort: 1180 Wien,  
Paulinengasse 13  
Uhrzeit: 18:00 Uhr

Tagesordnung:

1. Berichte des Vorstandes und der  
Kontrolle
2. Neuwahl des Vorstandes
3. Neufestsetzung des Mitgliedsbei-  
trages (in Euro)
4. Diskussion über die künftige Vor-  
gangsweise beim Abonnement des  
LEA/G-Magazino
5. Allfälliges

Wir bitten um zahlreiches Erscheinen!

Der ASLE-Vorstand

## Ek de 2002 nova monsisistemo

La nova monsisistemo *Eŭro* en la Eŭropo-komunumo, valida ek de  
la unua de januaro, 2002, necesigas ŝanĝon de la asocia kotiza  
tarifo. Ĉar la konverta kurzo – por Germanio: 1,9558 – kaŭzas  
neparaj monvaloroj, kluj povas malsimpligi ĝiradojn sur la asocia  
konto, ni kalkulis jenajn kotizojn:

Grupo	kategorio (Eŭro – Eŭ)	2002	ek de 2003
1:	aktiva membreco (laboruloj, pensiuloj) (aktive Mitglieder, noch berufstätig u. Altersruhegeldempfänger)	7,50	8,—
2:	pensiulo kun malalta pensio (Rentner mit niedrigem Einkommen)	6,—	6,—
3:	junulo ankaŭ studento ĝis aĝo 18 (Jugendliche auch Studenten bis 18 J.)	5,—	5,—
4:	pasiva membreco (ne voĉdon-raĵto) (passive Mitglieder ohne Stimmrecht)	8,—	8,—
<i>(La kotizoj de l'grupoj 1-4 entenas liveradon de la LEA/G-MAGAZINO k. adresaro!)</i>			
5:	familianoj (edzino, vivpartnero, infanoj sub aĝo 14) (Ehefrau, Lebensgefährtin, Kinder bis 14 J.)	2,50	3,—
<i>(Neniu liverado de la LEA/G-revuo k. adresaro)</i>			
6:	Nura abono de MAGAZINO Livero de la adresaro (Nur ABO u. Adressverzeichnis)	8,— 2,—	8,— 2,—
7:	subtenantoj, simpatiantoj -minimume- (fördernde Mitgliedschaft – mindestens)	25,—	25,—

*(Ricevas MAGAZINO-n k. adresaron, voĉdon-raĵto;  
erhalten die Bundeszeitung u. Anschriftenverzeichnis, sind stimmberechtigt!)*

*Bv. ĝiri vian kotizon/abonprezon ĝustatempe en la unua kvartalo de  
la jaro 2002 al (Bitte, überwiesen Sie Ihren Beitrag rechtzeitig im  
ersten Quartal des Jahres 2002 an:)*

*Jiri PROSKOVEC, Dortmund*

*Konto: 9168-434 Postbank Essen (BLZ 360 100 43)*

Jam nun elkoran dankon por via subteno.

Jiri Proskovec

Albert Stephan



## «KOMUNA KONSPIRO KONTRAŬ LA REGISTARO» aŭ 1a de Majo en Varsovio kaj la «REVOLUCIAJ TAGOJ»

de Lukaso Wróbel

Mi volas priskribi al vi tagojn de diversaj agadoj, kiuj okazis de la 27a de aprilo ĝis 3a de majo en Varsovio. Tiuj ĉi agadoj estis malsamaj kaj rilatis al socipolitikaj aferoj. Generale, ĉiuj havis liberecan karakteron kaj preparis ilin multe da grupoj, ne nur el Pollando.

### 28a-29a de aprilo: «Malfermaj limoj por mondo sen rasismo kaj seksismo»

Tiu ĉi dutaga agado estis komune organizita de polaj kaj germanaj anarkiismaj rondoj de la kontraŭseksisma/kontraŭrasisma movado. La iniciato estis senprecedenca, ĉar unuafoje okazis ĉi tiu tipo de kunlaboro inter polaj kaj germanaj gek-doj. Je la 28a de aprilo oni planis komunan renkontiĝon kaj debaton kun germanaj gastoj, kreante samloke aŭtonomajn, kontraŭrasismajn, feminismajn/lesbajn grupojn (germane: Frauen/Lesben), gvidantajn la agadon «Kein Mensch ist illegal» (Neniu Homo Estas Nelaŭleĝa). La renkontiĝo okazis en punk-muzikklubo «B-25» en Varsovio. Kunvenis ĉirkaŭ 50-60 personoj. De la pola flanko, tiun ĉi agadon organizis virinoj el la anarkifeministina grupo «EMANCYPUNX».

La unua preleganto estis la direktoro de la centro por gefuĝintoj en la urbo *Łódź* (nemalproksime de Varsovio) – Piotr Mitzer. Li priskribis la situacion en sia centro kaj li ankaŭ parolis pri la ĝenerala situacio de la rifuĝintoj en Pollando (senĉesa leĝrompo flanke de la pola registaro rilate al tiuj ĉi homoj, kiuj serĉas pli bonan vivon eksterlande).

Poste okazis disputo pri tiu ĉi temo, germanaj anarkiistoj volis scii multe pri deportadoj el Pollando (la haltigo de homoj ĉe la orienta limo de Pollando dikte de la Eŭropa Unio).

La sekvanta punkto de la renkontiĝo tuŝis problemojn de samseksemuloj en Pollando kaj la tuta mondo. Oni invitis la prezidanton de la Internacia Asocio de Gejoj kaj Lesboj por Kulturo en Pollando – Szymon Niemiec. La situacio de samseksuloj en la pola kulturo estas plej ofte malbona, superregas maltoleremo, kiu plimultiĝas dank' al la agado de la pola katolika eklezio. Tute nova konstato estas, ke samseksuloj, kiuj ĝis nun ne kunlaboris kun la pola anarkiisma/kontraŭseksisma movado, nuntempe volonte volas agadi kune kun nia rondo, esperante tiel plibonigi la situacion de gejoj kaj lesboj.

La germanaj gastoj parolis kaj ege interese prezentis agadojn, kiuj rilatis al: kontraŭrasismo/kontraŭseksismo, agadoj kontraŭ perforto, kontraŭ la deportada politiko de la germana registaro kaj germanaj konzernoj kaj por evoluigi virinan konscion. Unu el la kamaradinoj prezentis ankaŭ lumbildojn kaj fotojn el diversaj agadoj, kun flugfolioj, afiŝoj. Plej plaĉis al mi, ke la germana aŭtonoma medio aktivas iom alie ol la pola; ili akcentas la senperan metodon de agado. Tiuj ĉi agadoj kreskas el tradicio de protestoj de la '68a jaro, kion la pola liberecana movado malmulte partoprenis. Germanaj gek-doj prezentis filmon pri internacia, kontraŭdeportada agado «Neniu Homo Estas Nelaŭleĝa».

Rafał Pankowski, la prezidanto de Kontraŭ-Naziisma Grupo kaj eldonanto de la revuo *Nigdy Więcej* («Neniam Plu») parolis pri la historio kaj estonteco de la pola ekstremdekstra movado, kio vekis interesigon de eksterlandaj gek-doj.

Fine de la renkontiĝo, la 28a de aprilo, oni fiksas la detalojn rilate al la sekva tago. Tago de stratagadoj en ĉefloko de Varsovio...

### La 29a de aprilo - Stratagado «Limo»

Tiu ĉi agado havis kiel celon la praktikan sumigon de antaŭataga renkontiĝo. La stratagadoj konsistas el la kreado de absurda stato en centro de Varsovio (sub stacio de subtera fervojo) – ni kreis ĝiajn limojn, ĝiajn lingardistarojn (ekz-e mi havis rolon de policisto). Tiu «nia» ŝtato decidis pri la rolo de ĉiuj «civitanoj» (pasantaj je la loko de agado) – ni decidis, kiu povus resti en la «Imperio de Bono» (tiel ni nomis nian ŝtaton) kaj kiu devus estis punekzilitaj kune kun aliaj «nelaŭleĝaj». Ni ludis scenojn de la deportadoj, seksperfortoj de la virinoj el Afganio ktp. Ni volis konsciigi al pasantoj la situaciojn, en kiuj troviĝas rifuĝintoj, al kiuj, pro manko de taŭga pasporto oni rifuzas la elementajn rajtojn, apartenantajn al ĉiuj homoj. Intertempe oni disdonis kontraŭdeportadajn flugfoliojn... Tiu ĉi agado daŭris kelke da horoj. Policistoj volis malebligi al ni ĉi tiun organizadon de agadoj – sensukcese (mi kelkfoje estis turmentita de policisto, tiel same kiel kelkaj kamaradinoj). Generale, la agado sukcesis (i.a. estis multe da raportistoj de gazetaro, radio kaj televido...).

Vespere de la sama tago, ni rigardis artan ekspozicion de artisto el la urbo Vroclavo, Arek Bagiński (tre bone konata artisto en la liberecana/sendependa artrondo en Pollando). Li prezentis ekspozicion kun la titolo «Sistemo» – oni

povas rigardi multe da interesaj grafikartaj kaj ankaŭ mallongajn desegno-filmojn pri la temoj Holokaŭsto, ŝtata perforto (fragmentoj de stratbataloj de la '68a tempo), «urba malsano» (industriismo). La ekspozicio «Sistemo» tre plaĉis al ĉiuj gek-doj, kiuj estis tie ĉi (ĉirkaŭ 60-80 homoj).

### Manifestacio en la flughaveno Okęcie

...la 30a de aprilo. Pli frue germanaj gek-doj parolis pri planoj rilate la manifestacion en la varsovia flughaveno Okęcie kontraŭ la agado de Lufthansa, kiu festis la 75an jaron de sia ekzistado. La tutan manifestacion preparis geanarkiistoj el Germanio. El loĝejo de membroj de Maldekstra Alternativo (interurba, maldekstra-anarkiista grupo) ni iris al la flughaveno je la 9a horo. Surloke estis kelkaj membroj de Anarkiista Federacio, virinoj el Emancypunx kaj kelkaj punkuloj – sume, 20 personoj de la pola flanko (tial tiel malmulte, ĉar la agado estis malbone propagandita). Ni malpacience atendis la geamikojn el Germanio. Subite, ili venis per aŭtobuso – ĉiuj transvestiĝis kiel laboristoj de Lufthansa (pilotoj kaj stevardinoj). Tiu ĉi manifestacio koincidis kun la protestoj de gelaboristoj de tiu ĉi konzerno en Germanio (temas pri grandigo de salajroj por ili), sed ni volis akcenti aliajn aspektojn; ni protestis por tujaj kompensoj por eksaj getrudlaboristoj, laborintaj tie ĉi dum 2a Mondmilito, kaj ankaŭ por fini la forsendon de rifuĝintoj kaj genmigrantoj per «Lufthansa deportation class». Montriĝas, ke 10.000 da genmigrantoj jare estas deportataj el Germanio per aviadiloj de Lufthansa. La germanaj geanarkiistoj malvolvis slogantukon: «Lufthansa deportation class» kaj ni havis nian kun la slogano: «Malfermi Limojn – Fermi Registarojn». Intertempe, ĉiuj partoprenantoj de la mani-

festacio disdonis bultenojn kaj flugfoliojn informantajn pri nia agado (pole kaj angle), ĉar estis multege da homoj en la flughaveno. Ĉar la direktoro de la flughaveno kaj policistoj volis elpeli nin el tiu ĉi loko, okazis iom da tumulto. Policistoj registris kelkajn polajn k-dojn, rilate al la germanaj gek-doĵ policistoj estis silentaj. La agado estis registrita de kelkaj raportistoj kaj ĝi sukcesis.

### Ta de Majo – «Komuna Konspiro Kontraŭ la Registaro»...

...sub tiu ĉi slogano oni organizis grandegan manifestacion okaze de la 1a de Majo. Multe da liberecanaj, anarkiistaj, ekologiaj kaj maldekstraj grupoj kreis la «Komitaton M1» (M1 estas mallongigo de 1a de Majo), kiu okupiĝis, kelkajn monatojn pli frue, pri detaloj de la manifestacio. Tio forrabis multege da tempo, laboro de ĉiuj pli grandaj (kaj malgrandaj) liberecanaj grupoj el Pollando. Ni planis (dum protesto) iri tra ĉiuj ĉefaj stratoj de Varsovio. La manifestacio komenciĝis je la 13a horo. Alvenis multege da anarkiistoj el Pollando, Germanio kaj kelkaj personoj el Svislando – ĉirkaŭ 800 (kaj iuj parolas pri 1500, 2000) homoj. Oni flirtigis nigrajn kaj nigrajn-ruĝajn flagojn, aperigis slogantukojn kun tekstoj «Ne estas libereco sen justeco»; «Aŭtoritaton STOP!»; «Vivu la laborista solidareco»; «Kontraŭ policista perforto» kaj multe, multe da aliaj. Ni kiel grupeto de anarkiistoj-esperantistoj havis nian slogantukon: «ESPERANTO – unu lingvo, unu mondo – malfermitaj limoj». Ni disdonis flugfoliojn pri la por-esperanta agado en la anarkiista medio. Homamaso de manifestaciintoj iris ĉe la sonoj de diversaj anarkiistaj kanzonoj (ni havis nian aŭtomobilon, sur kiu estis grandegaj laŭparoliloj), i.a. la himno de CNT kaj multe da ĝojaj punkaj-revoluciaj tonoj. Estis ankaŭ la dancgrupo de

«sambo» kun la tamburoj, tamburegoj kaj fajfiloj kaj ankaŭ virina grupo de «Radical Cheerleaders» el Emancypunx, kiu senĉese dancis kaj kantis revoluciajn, anarkifeministajn tekstojn. La etoso estis vere bonega! Fojfoje gardis nin kordonoj de policistoj (ili timis stratribelojn), kiuj agresive provokis nin (ni prepariĝis je tio, ni havis la «Nigran Blokon»- grupon de radikalaj anarkiistoj, kiuj defendis la manifestacion antaŭ la policistoj). Kelkaj k-doĵ estis arestitaj, do ni spontane faris sid-proteston, por ke policistoj liberigu niajn kolegojn. La etoso iĝis pli kaj pli malbona (estis tre varmege kaj la policistoj kun tuta ekipaĵo estis tre agresivaj). Homoj komencis reagi je tiuj ĉi porkoj, okazis, ke unu el la membroj de Varsovia Anarkiista Federacio komencis batalon kun la policistoj. La tuta protestgrupo haltis en la stratoj de ambasadoroj de okcidenteŭropaj landoj kaj Usono. Finfine, niaj k-doĵ estis liberigitaj kaj la policistoj rezignis pri sekvaj provokoj.

Malfacile estas priskribi ĉiujn aspektojn de tiu ĉi manifestacio; rilate al ideoj, renkontiĝis diversaj medioj de la maldekstra/liberecana movado. Ĉiuj grupoj povis laŭtlege siajn postulojn pri la temoj de detruo de la laborista medio per kapitalista sistemo, pri la temo de malsanaj agadoj de «nia» registaro, kiu volas iri al Eŭropa Unio ne kalkulante, kiom da malbono (por gelaboristoj, terkulturistoj, malgrandaj entreprenistoj ktp.) ligiĝas kun tio. Ni volas akcenti, ke 1a de Majo ne estas tago de «Festo de Laboro» (kiel estis en la malnova, komunista sistemo), sed Tago de Batalo por ekhavi pli bonan situacion, kiu estu memorigo pri detruo de fabrikoj per granda kapitalo, pri «renoviĝo» de la Laborkodekso, kiu jam ne garantias la socialajn rifuĝejojn por ĉiuj laboristoj.

## SAT-Kongreso en Nagykanizsa

Jus antaŭ kelkaj semajnoj finiĝis la 74a Kongreso de SAT, ĉi-jare okazinta en la sudokcidenta angulo de Hungario, en Nagykanizsa, de 2001-07-14 ĝis 07-20.

Por mi ĝi estis la unua SAT-kongreso, kaj ĝi superis multilate tion, kion mi antaŭe aŭdis pri SAT-kongresoj – almenaŭ la partoprenantoj estis iomete pli junaj, iliaj temperamentoj iom malpli tempestecaj kaj la debatoj iom malpli kaosaj ol mi pro kelkaj priskriboj antaŭtimis. Kaj la turisteca orientiĝo malpli superrega.

Mi ne trovis tempon por ekskursi. La surloka programo, kvankam ne plenpakita, ne estis senstreĉa, ĉar unu el la plej gravaj eroj estis la laborkunsidoj, kiuj daŭris entute 11 horojn. Laŭ mia proksimuma takso, ĉ. duono de la kongresanoj ne bojkotis ilin. Dufoje kunvenis la LEA-komitato, dufoje la Liberecana Frakcio, unufoje la Sennaciisma Frakcio. Prelegis Tatjana Auderskaja, Kep Enderby (pri sennaciismo), Yvo Peyraut, Renato Ballaguy. Tra la varia vespera kulturprogramo gvidis Anjo Amika.

Ni dankas al la LKK-anoj pro la antaŭkongresa kaj dumkongresa peniga zorgado pri la bonfarto de la kongresanoj! La urbo Nagykanizsa estas ne sur la turisma itinero, sed malgranda kaj malgrandurb-etos, kio kontribuis al la trankvila traviviĝo de la kongreso.

Gravas, ke kelkaj problemoj de la Asocio kondukiĝis en la direkto de solvo. La venonta Plenumkomitato estos ne plu nur-pariza, kio necesigos la transiron al tia retpoŝta komunikado, kian aliaj organizajoj jam sukcese aplikas. La Gvidrezolucio alvokas: «La Kongreso konsideras. a) retaliron b) kapablon uzi retpoŝton gravaj faktoroj de kunlaboro en la PK, la ĜK kaj la Konfliktkomisiono.

Ĝi alvokas al solidara helpemo de SAT, por ke la elektitoj disponu pri tiuj rimedoj.» Ekmaŭri siajn problemojn SAT verŝajne neniel povus sen antaŭenpuŝi la uzadon de modernaj komunikiloj.

La jam malnova malferma letero de la Plenumkomitato al IKEK, dorno en la karno de la Asocio jam de jaroj, estis malvalidigita de la kongresanoj preskaŭ unuanime, kun unu kontraŭvoĉo.

La dissendolisto «SAT-Diskuto», iam atakita pro la kredata nekonstruiveco de la kritikoj esprimitaj en ĝi, nun ŝajne akiris ĉies favoron. Jam nun ĝi estas ne forimagebla forumo, samgrade legitimita kiel la SAT-kongreso en la elformiĝo de la tutasocia opinio.

La kunvenintaj SAT-anoj, starantaj antaŭ la alternativo, ĉu al la Esperanta Civito aliĝu SAT ĉu *Sennaciulo* ĉu eventuale *Sennacieca Revuo* (kio eblas laŭ la Civita statuto kaj ebligis al la unuopaj abonantoj «civitaniĝi»), malakceptis ĉiujn tri eblojn per konvinka plimulto.

La damokla glavo de financa krizo plu pendas super la kapo de SAT. La optimisma tono de la kongresaj debatoj esprimiĝis en la espero, ke la pliboniĝinta *Sennaciulo* – io, kion multaj kun kontento konstatis, kaj kion oni dankas al la redaktoro kaj lia minado de interesa enhavo en «SAT-Diskuto» – konvinkos kelkajn tenacajn nealiĝemulojn membriĝi. Evidente, pliaj membroj enorme utilus al SAT nuntempe.

La nova PIV proksimiĝas al sia eldoniĝo.

Afero, al kiu mi persone estas koreligita, estas la Sennaciisma Frakcio. Ĝi rekonstituiĝis dum la kongreso (vd. la apartan artikolon).

### Ĉu vi *ne* estas membro de SAT?

Ke SAT havas monproblemojn, ke okazas prokrastoj ĉe la finpretigo de la nova eldono de *PIV*, estas sufiĉe konate. Ke okazas lastatempe revigliĝo de la politikaj debatoj sine de la Asocio, ne laste en tiu formo, ke *Sennaciulo* per eluzo de la pli kaj pli multigantaj mesaĝoj en «SAT-Diskuto» iĝas organo de viglaj opiniinterŝanĝoj, estas eble ankoraŭ ne rimarkita de ĉiu.

Se vi ankoraŭ ne estas membro de SAT, konsideru aliĝi kaj aktive partopreni la debatojn en politika asocio, kiu vivas pro la senpera partopreno de la unuopaj membroj. Membro ricevas *Sennaciulon*, *Sennaciecan Revuon* kaj la ĉiudujan *Adresaron*. Retligita membro povas partopreni la dissendoliston «SAT-Diskuto» ĉe [www.yahogroups.com](http://www.yahogroups.com).

La tuta organizita kolektivo de esperantistoj pli politikigis kaj malpli rigide komprenis sian «neŭtralecon» dum la pasintaj jardekoj. Kunzorgu, por ke ankaŭ memstara maldekstra/progresiva voĉo aŭdiĝu.

Informoj pri membreco ĉe la perantoj:

- en Aŭstrio: d-ro Klaus Karner, Schützenstr. 44e, AT-6020 Innsbruck
- en Germanio: Jiri Proskovec, Heimbaustr. 10, DE-44143 Dortmund, <[proskovec@aol.com](mailto:proskovec@aol.com)>
- en Svisio: Erna Döring, Poŝtfako 225, CH-4003 Basel, <[ishim@hotmail.com](mailto:ishim@hotmail.com)>

## La Sennaciisma Frakcio de SAT rekonstituigis

La Sennaciisma Frakcio de SAT, kiu dormis dum jaroj, estis reestablita ĉe la ĵusa SAT-Kongreso en Nagykanizsa (Hungario). Grupo de proksimume dek frakcianoj kaj aro de observantoj kunvenis vendrede, 2001-07-20. Oni konstatis kreskantan intereson pri revivigo de la frakcia laboro, montriĝinta komence de julio per la starigo de la dissendolisto «Sennaciismo» ĉe [www.yahogroups.com](http://www.yahogroups.com). Ĝin administras Vilhelmo Lutermano <[vlutermano@free.fr](mailto:vlutermano@free.fr)>.

La kunvenantoj diskutis tekston de «Deklaracio pri sennaciismo», kiu elnombras kelkajn taskojn de la sennaciisma frakcio. Temas pri principdeklaro heredita de la pli frue funkciinta frakcio. Oni retralaboris ĝin, farante multajn ŝanĝojn. Certe necesos ankoraŭ plu

rafini ĝin. Ĝi eldiras i.a., ke la naciismo estas «unu el la bazaj elementoj de la nuntempa socia sistemo», narkotilo, per kiu la ekspluatistoj obeigas siajn servistojn, kaj afero, kiun la frakcio kontraŭbatalu kaj ĉe esperantistoj kaj ĉe neesperantistoj. Pliaj diskuttemoj de la kunveno estis la rilatoj kun simpatiantaj ne-SAT-anoj kaj la nocioj «raso», transnaciismo kaj mondcivitanismo. Levigis nome la demando. Ĉu eble «transnacia» aŭ «mondcivilana» estus pli taŭgaj priskriboj ol «sennaciisma», kvankam oni fine konstatis, ke aliaj jam «okupis» tiujn aliajn terminojn, dum la sennaciismo sub tiu nomo estas tradicia proprajo de SAT.

La memstara sennaciisma agado utilos ankaŭ por malhelpi la identigadon

de la fakte tre diverstendenca SAT kun la sennaciismo. Tiu konfuzo oftas ekster la SAT-medio.

Oni konstatis la bezonon de regula bulteno, eĉ se ĝi estus malampleksa, kaj TTT-ejo. sed oni ankoraŭ ne faris pri tio konkretan decidon. Interna komunikilo restas la interreta dissendolisto, kiun akompanu regula perpoŝta havigo de mesaĝoj al ne-retligitaj membroj (pri kio oni kontaktu Gary Mickle, Brüsseler Str. 6,

DE-13353 Berlin, <[gmickle@nexgo.de](mailto:gmickle@nexgo.de)>). La frakcio ja disponas spacon en *Sennaciulo* kaj kiel jam pli frue en *Laŭte!* por pliaj komunikoj.

La frakcia adreso estas ĉe: Djémil Kessous, 38 rue du Capitaine Cocart, FR-91120 Palaiseau, <[dkessous@club-internet.fr](mailto:dkessous@club-internet.fr)>.

Gary Mickle

Dum la 73a kongreso de S.A.T., okazinta en 2000 en Moskvo, la partoprenantoj alprenis Gvidrezolucion, kiu i.a. «aprobas la proponon de la Odesa grupo 'Esperanto 2000', kiu celas la enkondukon de Esperanto en internaciajn rilatojn sur ŝtataj niveloj, kaj tiucele komisiis la Plenumkomitaton instigi la LEA-ojn kontakti kun aliaj esperantistaj movadoj por ĝin apogi.» Tion la PK faris, sed la LEA-oj... Gekamaradoj el Odeso, kiuj partoprenis la ĉi-jaran kongreson en Nagykanizsa, bedaŭris ilian praktike nulan reagon. La ĉi-jara Gvidrezolucio – ĉi-foje pli singarde – «proponas sendi al ĉiuj LEA-oj la tekston de la Iniciata Grupo de Odeso kun peto alpreni starpunkton pri ĝi.» Multaj kongresanoj konstatis, ke la *peresperanta* SAT ne kompetentas pri tia afero, sed pluraj ankaŭ esprimis dubojn pri la realismo de la propono. Oni dubis, ĉu la LEA-oj estas ĉe ĉi-speca ambicia projekto la unuavice alparolenda medio, aŭ ĉu ne ekzemple la jam ekzistantaj grupoj, kiuj okupiĝas pri tuteŭropaj aferoj kaj EU-kontaktoj. Sendepende de tio, ĉu aktiva SAT-grupo ne meritas almenaŭ honestan opiniesprimon de la LEA-oj pri la iniciato? Ni dokumentas la tekston, kiun la odesanoj kunportis al Nagykanizsa.

### Mesaĝo al la gvidantaro de UEA kaj laboristaj Esperanto-organizoj, ligitaj al SAT

Pasis 114 jaroj post la kreo de ESPERANTO, sed ĝis nun ĝi ne fariĝis lingvo de internacia komunikado en ĉiuj landoj de la mondo.

Neregistaraj klerigaj organizaĵoj apogas ESPERANTON. Tio estas bone. sed kion fari plu?

Unesko apogas Esperanton. Tio estas bonege, sed kion fari plu?

Iniciata grupo de Esperanto-klubo «Blanka Akacio» en la urbo Odessa (Ukrainio) en konsisto de tri personoj: Semjon Vajnblat, Tamara Popova kaj Ludmila Orajevskaĵa – proponas jenan

planon por akcepti Esperanton kiel **interŝtatan** lingvon de komunikado en ĉiuj landoj de la mondo:

1. La plej grandaj kaj aŭtoritataj Esperanto-organizaĵoj – UEA kaj SAT – devas unuigi siajn fortojn por solvi la problemon.

2. UEA kaj SAT elektas la Specialan Kunordigan Komisionon, kies celo estu helpi al Esperanto-organizaĵoj dum efektivaigo de tiu ĉi plano.

3. Kunordiga Komitato turnas sin al ĉiuj naciaj Esperanto-asocioj de la mondo kun la peto fari jenon:



- a) La nacia Esperanto-asocio devas sendi al parlamento (aŭ alia leĝdona organo) de sia lando la dokumentaron. Ĝi devas enhavi: karakterizon de Esperanto kiel lingvo, kiu kapablas plenumi ĉiujn funkciojn de la internacia lingvo de komunikado; faktojn de stato de Esperanto-movado en ĉi tiu lando; aliajn necesajn informojn.
- b) La nacia Esperanto-asocio devas turni sin al parlamento (aŭ alia voĉdona organo) de sia lando kun mesaĝo – konatigi la membrojn de la parlamento kun la ideo de internacia lingvo kaj konsideri la akcepton de Esperanto kiel interŝtata lingvo de komunikado.
- c) Se la parlamento pozitive solvos la problemon, tiam la decido de la parlamento devas esti konfirmata de la landa prezidanto (aŭ alia alta ŝtata postenulo).
- ĉ) La naciaj Esperanto-asocioj devas sendi al la Kunordiga Komitato Rezolucion de la parlamentaj decidoj pri la problemo.
4. La Kunordiga Komitato devas ĝis la 2003a jaro raporti pri la rezultoj al la gvidantaro de UEA kaj SAT.
5. Se la plimulto de landoj, al kiuj estos sendata la MESAĜO, akceptos ESPERANTON, la Gvidantaro de UEA kaj SAT devas turni sin al UN kun la peto meti demandon pri akcepto de Esperanto kiel interŝtata lingvo de komunikado por ĉiuj landoj-membroj de la mondkomunumo dum Ĝenerala Asembleo de UN, kiu devas esti speciale dediĉita al tiu ĉi problemo. Al UN devas esti prezentata la motivado, kiu karakterizas la ekonomiajn avantaĝojn por ĉiuj landoj de la mondo, se oni akceptos la lingvon Esperanto kiel lingvon de komunikado.

6. Se la kvanto de landoj, kiuj apogas Esperanton, ne konsistigos la plimulton, aŭ se la Ĝenerala Asembleo ne voĉdonos por pozitiva solvo de ĉi tiu problemo, sekve, la mondkomunumo ankoraŭ ne estas preta por solvi la problemon. Tiukaze la Gvidantaro de UEA kaj SAT devas ĉiujn du jarojn ripeti tiun procedon, ĝis kiam la plimulto de landoj konvinkigu pri neceso akcepti Esperanton kiel interŝtatan lingvon de komunikado.

7. Ĉi tiu plano estas la skizo, kiun eblas kompletigi per ĉiuj proponoj, kiuj kontribuu al atingo de la plej grava celo – akcepto de Esperanto kiel interŝtata lingvo de komunikado en ĉiuj landoj de la mondo.

8. Estas dezirinde ĉi tiun planon pritrakti dum la kongresoj de UEA kaj SAT en la jaro 2001 kaj ricevi apogon de la kongres-partoprenantoj.

La iniciata grupo: Semjon Vajnblat  
Tamara Popova  
Ludmila Orajevskaja

2001-07-10

## novaĵoj

### Biciklomanifestacio en Berlino

2001-06-10: Ses berlinaj geesperantistoj partoprenis la ĉi-jaran «stelveturon», veturante de Wannsee al la pluvplagita naturmedio-festo ĉe Unter den Linden, kie inter la informstandoj troviĝis denove ankaŭ Esperanta. (GM)

### Triangulujo serĉas helpantojn

La Esperanto-sekcio de Radio Dreyeckland en Freiburg (Germanio) ankoraŭ serĉas kunlaborantojn, i.a. tradukantojn, redaktorojn kaj parolitojn. Rete ĉe [www.triangulujo.de](http://www.triangulujo.de), kontakto retpoŝte ĉe [fers@gmx.de](mailto:fers@gmx.de). (GM)

Nova ideo: ĉu paralela du-ebena lingvosistemo por Eŭropa Unio?

## Esperanto ĉe SILF

de d-ro M. Butan

La *Société Internationale de Linguistique Fonctionnelle* (SILF) aranĝis (04-08 aprilo ĉi-jare) en la Eŭropa Universitato Frankfurt/Oder sian 25an internacian kolokvon (laborlingvoj: franca, germana, angla). La temaro de Sekcio 1 (*Lingva politiko*) invitis la lingvistojn proponi respondojn al jenaj demandoj: Kiel komunikos la diverslingvanoj en EU? Ĉu Eŭropo povas kontentiĝi per unu sola vehikla lingvo, la angla? Kiuj estus la konsekvencoj por la ceteraj lingvoj? Kiu alternativo al la angla?

En sia referaĵo *La plureco de la lingvoj kaj/aŭ neŭtrala lingvo*, d-ro M. Butan (Rumanio) pledis por Esperanto kaj, kiel alternativon al la angla, prezentis la koncepton de prof. I. F. Bociort pri *paralela du-ebena lingvo-sistemo por EU*. Jen la esenco de tiu koncepto: Ĉi-momente la angla estas nek tute evitebla, nek kiel sola vehiklo akceptebla; ni pripensu kulturhistorian sugeston: dum la mezepoko, la latina en Okcident-Eŭropo, la malnovlatina en pluraj (sud)orient-eŭropaj landoj (en filozofio, eklezio, scienco, oficialaj dokumentoj) funkciis paralele kun la naciaj lingvoj evoluantaj; en Grekujo, Ĉinio k.a. dum kelkaj jarcentoj funkciis paralele *du kulturlingvoj* (kun beletraĵoj ktp.) – unu malnova, tradicia, alia «nova», demokratia. Konsiderante la nekredeble kompleksan internacilingvan problemaron, estas hodiaŭ realisme (el politika, ekonomia, kultura, psiko-pedagogia k.a. vidpunktoj) imagi

por EU *paralelan* du-ebenan lingvosistemon: *trilingvismon germanan-francan-anglan* por iuj agadoj – diplomatio, sciencoj (precipe pozitivaj), naturaj, teknikaj) ktp. kaj *dulingvismon de naciaj lingvoj-Esperanto* por vojaĝoj, trafiko, sporto, medicina kuracado, gastro nomio, diversaj servoj ktp. La ideo, inspirita de koloniismo, enkonduki la anglan en ĉiugradajn lernejojn de Eŭropo estas nerealista, ruiniga, danĝera.

Kompreneble, la paralela sistemo ne havus rigidajn limojn. La lingvoj restas *de jure* egalaj, t.e. *nenia hegemonio*. Ĉiuj artaj-kulturaj forumoj, ĉiuj personaj – laŭ propraj bontrovoj, profesiaj intereso ktp. – povos praktiki ajnan lingvon, kio principe validus por ĉiuj ajn vivosferoj.

Dum la prelego cirkuladis inter la ĉ. 40-45 lingvistoj de la sekcio *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* (Krause), *Vocabulario italiano-esperanto* (Minnaja) kaj *Grand Dictionnaire Français-Espéranto* (Le Puil, Danvy).

Dum la diskutoj neniu kontraŭis la surprizan koncepton, oni nur miris, ke tiom malmulte faratas por *prestige* prezenti Esperanton al la ĝenerala publiko. Fakte la scienca etiko kaj profesia responseco pri la destino de validaj ideoj en la socio postulas de sciencistoj seriozan studadon de la problemaro, prestiĝan engaĝiĝon, kuraĝajn altnivelajn kontaktojn (personajn kaj per komunaj deklaroj) kun la naciaj kaj internaciaj instancoj, por prepari konscian, demokratian solvon al tiu ĉi gravega problemo niatempa.

\* Finfine ĉie estis adoptita la demokratia varianto.

## Parkinson-sindromo

Ni rememoras ĝojigan, sukcesplenan, belan tagon, kiun la suno varmigis. Ni estas malsanaj homoj en memhelpa grupo. Ĉiu el ni suferas pro la t.n. Parkinson-sindromo. Ni komune batalas kontraŭ la malsano por ne perdi nian vivkuraĝon.

Ofte ni renkontiĝas kaj priparolas metodon por redukti la malhelpojn. Pasintan fojon ni festis en la ĝardeno de unu el nia grupo. Tiu ĝardeno situas en ĝardenkolonio en iu el la belaj regionoj de Berlino. La amikoj, kiuj posedas aŭtomobilon, transportis partoprenantojn al la festejo.

Ĉiu kontribuis ĉu kukon ĉu kafon ĉu ion alian por la bona sukceso de la festo. Posttagmeze kafoklaĉo akompanita per kasedmagnetofona muziko kaj pli poste per elektronika klavaro, kiun nia amiko Helmut sperte uzis. Li ludis modernan muzikon kaj ankaŭ konatajn popolkantojn, kiujn ni povis kune kanti. Ni

estis gaja rondo. Kiu observis nin, certe ne rimarkis, ke festas malsanaj homoj.

Tiaj festoj taŭgas ankaŭ kiel terapio kaj ni ĝojos denove esti kune en gaja rondo iam estonte.

Ĉar mi kelkfoje rakontis pri la senco kaj celo de la Esperanto-ideo kaj klarigis interalie la homajn aktivecojn de S.A.T., oni opinias, ke ĝuste mi estus la taŭga malsanulo, kiu havas kontaktojn kun homoj en la mondo, kiuj same suferas de Parkinson. Oni ŝatus aŭdi pri helpmetodoj en aliaj fremdaj landoj. Mi, do, alvokas ĉiun esperantiston, kiu spertis kaj/aŭ suferas de Parkinson-sindromo, sendi informojn al mi. Jen miaj nomo kaj adreso:

Willy EHLERS  
Spießweg 38 loĝ. 86  
DE-13437 Berlin (Germanio)

Mi antaŭdankas pro viaj klopodoj, kiuj estos ankaŭ iom da varbado!

Ĉi tiu artikolo de Robert Kurz (grupo Krisis) aperis en *Neues Deutschland* de 2001-07-22. Dankon al Roland Schnell, kiu ĝin tradukis.

## Iluzioj pri la proprieto

de Robert Kurz

Socialigo. Iam ĝi estis programa sorĉvorto de la radikala maldekstrularo. Hodiaŭ verdulo kiel Rezzo Schlauch povas nur skui sian muskovovritan realistokapon, aŭdante ion tian. Ĉe aliaj aktoroj de la politika kaj amaskomunikila cirko la termino provokas eĉ enscenigon de indigno. Oni ekpensas pri la ŝtata socialismo kaj tion oni rigardas post ĝia pereco kune kun sia tuta terminaro kiel imperion de la malbono.

Kion socialigo fakte signifas, pri tio jam ĉiam estis konsiderinda konfuzo. Fakte, ĉiu socio estas socialigita, ĉar alie ĝi ne estus socio. Gravas nur la grado kaj la speco de la socialigo. Rilate al la grado temas pri la pli aŭ malpli granda denseco de la reciprokaj dependecoj, la disdivido de aktivecoj, la interimplikiĝo de la sociaj funkcioj ktp. En tiu ĉi senco la kapitalismo efikis la plej altan socialigon en la historio de la homaro. Sed ĝi

faris tion laŭ absurda kaj detrua maniero: En la formo de la moderna varoproduktanta sistemo ne estas homoj, kiuj estas socialigataj, sed la aĵoj de ili produktitaj en la formo de varoj.

La tutmonda kunludo de la produktivaj fortoj sin prezentas ne kiel konscian komunan aktivecon de homoj, sed kiel blinda fluo de varoj kaj same blinda agregado de mono. La homoj estas en sia ĉiutaga vivo multe malpli socialigataj ol en agraraj civilizacioj aŭ en la socioj de ĉasantoj kaj kolektantoj, nome tute ne socialigataj. En la kapitalisma socio de la totaleca varoproduktado ili estas pli difineblaj kiel solecaj unuopoloj, inter kiuj ekzistas rilato nur en la formo de ĉiufanka konkurenco. Ilia propra socia interligiteco aperas antaŭ ili kiel fremda potenco de la objektoj, kiujn ili mem produktis, kiel morta socia maŝino aŭ kiel la «nevidebla mano» (Adam Smith) de la anonimaj merkatoj.

La emancipa tasko do estus transformi la absurdan, senkonscian socialigon de la objektoj en konscian socialigon de personoj. La tiel nomata socialismo multe tro mallarĝe agis. Ĝi komprenis la juran formon de la posedo kiel pivotpunkton de la problemo. La privata posedajo de malmultaj estu transformata en la publikan posedajon de multaj. Sed tiel oni bridis la ĉevalon ĉe la vosto. Se la objektigatan socialigon anstataŭigas la socialigo de homoj kaj tiuj ĉi konscie decidis pri la utiligo de siaj komunaj resursoj, la formo de privata posedo de produktiviloj logike forfalas. Se oni sole per jura pompo fordekretas la formon de privata posedajo, konservante la realajn rilatojn de la morta objektigita socialigo, la afero devas malsukcesi.

Marx nomis ĉi tiun aliron en siaj fruaj verkoj "jura iluzio". Se oni jam trompiĝis de ĝi, restis nur du same iluziaj eblecoj

por la laŭsupoza, la kapitalismon transcendantanta socialigo:

- Unuflanke la formo de la ŝtata posedajo, kiu nobeligis la kapron al ĝardenisto. Ĉar la ŝtato kiel aparato mem estas produkto de la objektigata socialigo. Kaj la ŝtatanoj estas la izolitaj konkurantoj, kiuj nur poste interrilatas per esence juraj rilatoj. La ŝtato ne nuligas la absurdan, nesocialan socialigon de la varoproduktanta sistemo, sed administras ĝin kaj implikiĝas pli kaj pli profunde en ties kontraŭdiroj. Tial Marx nomis la ŝtatan la «iluzia komunumeco» de la socio. En la ŝtatsocialismo oni povis sperti, kiel la nerompita «nevidebla mano» kvazaŭ antaŭen pugnobatis la iluzian socialigon de la propraĵo.
  - Aliflanke, kaj parte kiel reago al la deficitaj de la ŝtata socialismo ekestis la ideo de kooperativa socialigo de la posedajo. Sed ankaŭ la formo de la kolektiva kooperativa posedajo ne sukcesis liberigi sin de la jura iluzio. Kiel formalaj kolektivaj posedantoj de siaj entreprenoj, la kooperativoj restis en la rilatoj inter si mem kaj rilate al la reala socialigo de la produktivaj fortoj sub la premo de la «nevidebla mano», kaj havis la alternativojn, ĉu bankroti, ĉu kapitalisma profesiigo.
- Ŝtatiluzio, kooperativa iluzio kaj la jura iluzio de pure formala proprietoŝanĝo, kiel bazo de ambaŭ, estas historie negitaj. Sed la absurda formo de la kapitalisma socialigo gvidas pli kaj pli profunde en la krizon kaj krie postulas esti transmetita de objektigita al homa bazo. La problemo de la socialigo devas troviĝi en la agendo por la 21-a jarcento, sed tute nove formulita kiel tutsocia organizmaniero transe de merkato kaj ŝtato. kaj por tio ankaŭ transe de la jura iluzio.

La ĝis nun fiaskinta ideo de la memmastrumado devas ampleksi la tutan socian fluon de resursoj kaj ties interrilatojn, do devas iĝi ĉiuflanka anstataŭ resti limigita al sola entrepreno. Tiam entreprenmastrumado ne plu estus entreprenmastrumado kaj la ŝtato ne plu

estus ŝtato. Vid-al-vid e la kreskantan nombron de sociekologiaj katastrofoj, la respondo povas esti evoluigata nur en tiu direkto, eĉ se ni, kiuj estas kapitalisme socialigitaj homoj, sentas pensblokadon kiel la «bovo antaŭ la nova pordo».

### La kongreso de SAT-Amikaro okazos de 2002-03-30 ĝis 04-02 en Vigy

#### UNUA KOMUNIKO

##### Loko kaj datoj.


La 57-a Kongreso de SAT-Amikaro okazos en Internacia Restada Centro proksima al vilaĝo Vigy (en departemento Moselle), la 30-an, 31-an de Marto, 1-an kaj 2-an de Aprilo 2002.

Vilaĝo Vigy troviĝas en la distancoj de 20 kilometroj de urbo Metz kaj 25 kilometroj de urbo Thionville.

##### Kongresejo.

La Kongreso disvolviĝos en sonkipita konstruaĵo povanta enteni 200-300 personojn, kaj plie disponos kunvenoĉambrojn, kiuj kovras diversajn areojn: unu 145-kvadratmetran, pluraj 20-50-kvadratmetrajn. La kongresanoj povos tranokti en dormoĉambroj por 1, 2, 3-4, 5, eĉ 10 personoj.

La tutaĵo de la ekipaĵoj estas partigita inter 5 malaltaj konstruaĵoj troviĝantaj en parko, kiu kovras 13-hektaran areon.



Vidajo el la centra pavilono de la Internacia Restada Centro.

Kampoj, herbejoj kaj arbaroj estas en la proksimeco de la Kongresejo.

##### Organiza Kongresa Komitato.

La O.K.K. esence konsistas el membroj de Esperanto-Klubo de la Tri-Lima Lando (Club d'Espéranto des Trois Frontières), kiu fondiĝis en Marto 2000, kaj funkcias sub la asociiĝa leĝo de la jaro 1908 aplikata en regiono Elzaco-Mozelio.

##### Precizigo.

La dirmaniero *Tri-Lima Lando* fontas el situo rilate Francion, Germanion kaj Luksemburgion.

##### Informado.

Informoj pri la Kongreso estas haveblaj sub la jena poŝta adreso: **Bruno Henry, 5, rue Jean Mermoz, 57100 Thionville** - Telefonnumero: **03.82.54.32.91** - Interreta adreso: **<bruno.henry3@libertysurf.fr>**.

La Komitato de SAT-Amikaro.

## novajoj

### Nova TTT-ejo de altenburganoj

La altenburga grupo «Karapaco» jam antaŭ monatoj malfermis ĉe [www.karapaco.de](http://www.karapaco.de) sian informan TTT-ejon. Enestas i.a. kompleta Esperanto-kurso kaj la ĝisdatigita teksto de *La mortula ŝipo* de B. Traven (romantraduko de H.-G. Kaiser el Altenburg). (GM)

### Indymedia en Esperanto?

La debaton ĉe <http://france.indymedia.org/> pri tio partoprenis i.a. Henri Masson de SAT-Amikaro, per kontribuo titolita (francilingve) «Bona demando kiu meritas pripensadon» kun la enkonduko «Kion pensi pri la demando 'Alia lingvo por alia mondo, ĉu tio estas ebla?' konsiderante la historion kaj la aktualaĵojn». Alparolante la esperantistojn, li konstatas, ke venis la tempo ne por paroli pri la lingvo, sed por ĝin paroli, ĝin uzi por estigi tiun ĉi sendependan amasinformilon pli efika, ankaŭ la tempo por kreskigi nian strebon de formado (instruado, trejnado) de instruistoj kaj de tradukistoj. «Kiuj aktivis en la SAT-movado jam havas tute nature sian lokon en tio, ĉar la celoj estas grandparte similaj kaj komplementaj.»

Indymedia prezentas sin jene :

*La reto Independant Media Center estas informagentejo kolektive mastrumata por krei bazojn de interkomunikaĵo radikala kaj pasia. Ni laboras laŭ aktiva maniero por paroli pri tiuj, kiuj volas ŝanĝi la mondon per ĝia plibonigo kaj kiuj devas alfronti amasinformilojn kiuj misprezentas ilian agadon aŭ timas raportoj pri la strebo de tiuj kiuj elektis agi por pli libera homaro. Nuntempe, ni povas esti ĉie en la mondo. En Usono, en Francio, en Prago, en Meksiko, en Kongio... Por krei TTT-ejon Independant Media Center en via lando, se ĝi ne jam ekzistas, ne hezitu nin kontakti.*

(Henri Masson)

**Krause, Erich-Dieter (1999): Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch [Granda Vortaro Esperanto - Germana].** Hamburg: Helmut Buske Verlag, IVX + 882 p., ISBN 3-87548-193-3, fortika bindaĵo, 19x12 cm

La ĝis nun supozeble plej granda iam ajn eldonita vortaro Esperanto-nacia lingvo aperis en 1999. La prestiĝa lingvistika eldonejo Helmut Buske Verlag Hamburg aperigis la vortaregon. La 882-paĝa, klarlitere kaj dense presita vortaro enhavas pli ol 80 000 artikolojn kaj lingvajn esprimojn en Esperanto kun siaj germanaj ekvivalentoj. La vortaro havas dulingvajn antaŭparolojn (germana, Esperanto), instrukciojn pri la uzo, listojn de mallongigoj kaj uzita literaturo. La lingva materialo konsiderinde superas tion de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV).

La Vortaro ne nur registras la ĉiutagan lingvon, sed ankaŭ prezentas multan faklingvan materialon el plej diversaj sciencaj kampoj. La vortaro sendube estas utiliga ankaŭ por nekonantoj de la germana lingvo. Ĉiu serioza germana esperantisto devus posedi tian vortaron, se li/ŝi vere volas kiom eble plene eluzi kaj majstri la lingvon.

La aŭtoro estas unu el la malmultaj profesie trejnitaj leksikografoj, pri kiuj disponas la esperanta lingvo-komunumo. Li estis profesoro pri indonezia lingvo ĉe la Universitato de Leipzig, membras en la Akademio de Esperanto. Li verkis i.a. ampleksan vortaron germanan-Esperantan kun pli ol 40 000 artikolvortoj, kiu haveblas ĉe la eldonejo Langenscheidt, krome grandajn vortarojn por la indonezia lingvo. La du malgrandaj vortaroj Esperanto-Germana kaj Germana-Esperanto aperis kunbinditaj same ĉe Langenscheidt.

La nova libro estos havebla kontraŭ ĉ. 78 markoj (ĉ. 39 eŭroj) ĉe UEA aŭ aliaj libroservoj. (laŭ informo de D. Blanke)

## LETEROJ AL LA REDAKCIO



skribas Wolfgang Gunther, DE-34292 Ahnatal-Weimar (2001-07-30 kaj 2001-08-28):

LA plezursocia evento 2002:  
**FESTIVALO  
 DE LA KULTURMALSANOJ  
 (FEKUMO)**  
 Dumtutjare  
 solenaĵas, Kongresas & festas  
 — senheimuloj & azipetantoj  
 — evakuitoj & amnestiitoj  
 — trafik- & drogo — viktimoj  
 — alergiuoj & eksriculoj  
 — "leĝo- & ordo"-trafitoj  
 — normaluloj & EBLE VI!  
 Organizas: NULA HORO

Carlo Ghiliani  
 8 demokratioj -  
 la regno de kapitalo & profito,  
 socie disbranĉiga & dispartiga:  
 la riĉuloj kunvenas  
 & la malriĉuloj portas la riskon,  
 la riĉuloj kongresas  
 & la malriĉuloj ne plu kontentas  
 pri pano & ludoj.  
 La deficitoj pri partoprenigo  
 evidentas:  
 Polico anstataŭ dialogo...  
 Jen la absurda groteskaĵo,  
 nomata demokratio:  
 instalita publika perforto,  
 arogata edukilo por nekonsformuloj  
 & korpa eksercoprogramo  
 por psike nekompententa polico.  
 La justo estigas en la kapo  
 & ĝuste ĉi tie ĝi ankoraŭ destruktas.  
 Kondamne investante preter la amaso,  
 (Por kio do ĉiu vivo egalvaloras?)  
 la kunfiguriga manaĝado  
 de la 8 superŝtatoj mensenas  
 fiaskis & nun ni scias:  
 Demokratio signifas ankoraŭ  
 malvarman kugilon en varma cerbo.  
 La 20-an de julio 2001  
 ĉi demokratio mortigis  
 & fonten eskapis...  
 Carlo devis kion oni ne faru  
 & la demokratio ne faris kion oni devu.  
 La kugilo, kiu senvivigis 20-jarulon,  
 certe tamen maltrafis...

NULA HORO  
 Lupiro el Anavalo (01-07-23)  
 (- Ĉu perforto ahskultigas potenulojn?)

! & OJRO

Koncerno: USA, SAT ktp., Blanke, Silber, Kickle ktp.,  
 finvenkismo, rabismo, ĉiuj ismoj,  
 civitoj, ĉiuj itoj ktp., ĉiuj ĉirilatej  
 artikoloj & respondoj ktp. ĉi de 2.100  
 jaroj

ekas la  
 plena  
 problemo

- KIAM ONI KOMPRENAS ESPERANTON LINGVO...
- Esence ĉi estas biosfera komunikata profilaktiko,  
 komunikata preventilo de la pensa viva materio...
  - transe de ĉiuj sugestoj & subsugestoj  
 "FOR" aŭ "KONTRAŭ" io  
 la antropocentraj ideoj &/aŭ ideologioj...
  - Ĝi tadas pro si mem  
 & ne bezonas kialigon,  
 samkiel ĉe la paco & la homaj rajtoj...
  - Gravas la efektivego  
 surbaze de memkomprenebla ekologia idento,  
 samkiel ĉe la paco & la homaj rajtoj...
  - La onto estos ekologia aŭ tute ne!  
 Esperanto estos ekologia aŭ tute ne!

Remitante: NULA HORO  
 (Magra Fazo Kassel)  
 Lupiro el Anavalo  
 (Don Mail)  
 Schulstr. 7  
 DE-34292 Ahnatal-Weimar, FRG

El faroj  
 kiel laboro!  
 V. Caldas  
 01-07-30

anonco

**MIA SLOSILTRUO** verkita de Josef Schiffer estas germanlingva broŝuro enhavanta malgrandan Esperanto-kurson kaj ampleksan informmaterialon pri Esperanto. Pro ĝia eksterordinara eldonkvanto de 10 000 ekzempleroj (!) la vendoprezio de la broŝuro estas treege malalta. Tial oni povas aĉeti *Mia Slosiltruon* grandkvante por disdoni ĝin al germanlingvanoj.

**MIA LERNOLIBRO** de Josef Schiffer estas germanlingva lernolibro. Por montri la propedeŭtikan valoron de Esperanto nun estas aldonita la libreto **LEARNING ENGLISH WORDS IN SENTENCES**. Ĝi instigas samtempe lerni la respektivajn anglajn vortojn en facile kompreneblaj anglaj frazoj.

*Große Werbeaktion für Esperanto! Machen Sie mit!*

*Liebe Esperanto-Freunde, damit Sie umso lieber mitmachen können, wurde der Verkaufspreis für Mia Slosiltruon nochmals gesenkt, siehe den folgenden Text.*

*Mia Slosiltruon/Mein Schlüsselloch, das in einer Auflage von 10.000 Exemplaren erschienen ist, enthält einen in sich abgeschlossenen kleinen Esperanto-Kurs mit Wörterverzeichnis und umfangreiches Informationsmaterial über Esperanto. Der Verkaufspreis konnte aufgrund der hohen Auflage auf nur DM 1,50 reduziert werden; ab 3 Exemplaren 10% Rabatt. Dadurch hoffen wir, dass möglichst viele Esperanto-Freunde diese Broschüre in großer Stückzahl kaufen werden, um sie an Interessenten zu verteilen! 52 Seiten, Format DIN A5, Bestellnummer 010 B. Machen Sie mit bei dieser großen Werbeaktion für Esperanto!*

Prezoj, pliaj informoj kaj mendoj ĉe / Zu bestellen bei:

Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, 78050 Villingen-Schwenningen,

Tel. +49 77 21 - 5 89 91 kaj

fakso +49 77 21 - 50 88 91

Retadreso: [josef.schiffer@esperanto.de](mailto:josef.schiffer@esperanto.de)

Hejmpaĝo:

<http://home.t-online.de/home/josef.schiffer/>

anonco

nova memor-helpilo

En [www.mikox.de/memoro.htm](http://www.mikox.de/memoro.htm) vi trovos novan memor-helpilon, kiu utilas por enmemorigi vortojn. Ĝi taŭgas pli bone por lerni Esperanton ol por lerni iun alian lingvon (escepto: lerni alian planlingvon). En [www.mikox.de](http://www.mikox.de) ekzistas ankaŭ versioj en la germana kaj en la angla. Michael Kox <[michael@mikox.de](mailto:michael@mikox.de)>

## Enhavo:

	paĝo
Liberal – Frei / Libera (Albert Stephan)	1
Anakronismaj LEA-oj kun aktuala ekzistkialo (Gary Mickle)	3
<b>La Socialisto</b>	
Sieger und Sprachen / Venkintoj kaj lingvoj (Herta Niessner)	8
ASLE: Ordentliche Generalversammlung	8
Ek de 2002 nova monsisistemo (novaj kotizoj)	9
Komuna konspiro kontraŭ la registaro / Revoluciaj tagoj (Lukas Wróbel)	10
SAT-Kongreso en Nagykanizsa (GM)	13
Ĉu vi ne estas membro de SAT?	14
La Sennaciisma Frakcio de SAT rekonstituigis (GM)	14
Mesaĝo al la gvidantaro de UEA kaj laboristaj Esperanto- organizaĵoj, ligitaj al SAT (odesaj gek-doj)	15
NOVAĴOJ	16
Esperanto ĉe SILF (M. Butan)	17
Parkinson-sindromo (W. Ehlers)	18
Iluzioj pri la proprieto (R. Kurz)	18
Kongreso de SAT-Amikaro	20
Nova vortaro de E.-D. Krause	21
NOVAĴOJ	21
LETEROJ AL LA REDAKCIO	22